

Esperanto-literaturo

Listo de la elektotaj skribtaskoj por la unua periodo

(prozo, teatro, poezio)

01. Ĉu Zamenhof ĉerpis saĝaĵojn de via popolo por sia *Proverbaro*?
02. Ĉefaj trajtoj de la eseo de Zamenhof „*Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia*”
03. La Zamenhofa vojo al la „interna vojo” tra hilelismo kaj homaranismo”.
04. Kongresa parolado de L. L. Zamenhof ĉe la 1-a Universala Kongreso de Esperanto (1905, Bulonjo-sur-Mar) (esenco kaj aktualeco).
05. Kongresa parolado de L. L. Zamenhof ĉe la 2-a Universala Kongreso de Esperanto (1906, Ĝenevo) (esenco kaj aktualeco).
06. Kongresa parolado de L. L. Zamenhof ĉe la 3-a Universala Kongreso de Esperanto (1907, Kembriĝo) (esenco kaj aktualeco).
07. Kongresa parolado de L. L. Zamenhof ĉe la 8-a Universala Kongreso de Esperanto (1912, Krakovo) (esenco kaj aktualeco).
12. Ideoj de Hector Hodler pri la organizo de Esperanto-movado. Ĉu la nuna UEA sekvas la vojon montritan de li?
13. *Novaj vojoj* (perlo de la Esperanta ĵurnalismo) – ĉu la opinioj de Hector Hodler pri la organizo de ŝtatoj kaj principoj de la interpopola konduto estas aktualaj ĝis la nuna tempo?
14. *En la brikejo* de Józef Waśniewski – ĉu malgranda trezoro de novelarto?
15. Henri Valienne – la plej grava prozoverkisto en la unua periodo.
16. *Ginevra* de Edmond Privat – plej rimarkinda dramo antaŭ la unua mondmilito.
17. Teatraj prezentadoj dum la 8a krakova Universala-Kongreso de Esperanto (1912).
18. Rolo kaj signifo de la internaciaj revuoj (*La Esperantisto*, *La Revuo*, *Lingvo Internacia*) por la evoluo de Esperanta-literaturo ĝis la 1a mondmilito.
19. Esperanto-literaturo – kien? (*Pri Esperanta literaturo* de Edmond Privat).
20. Kabe kiel majstro de la proza traduko en *La Faraono* de Bolesław Prus
21. Kabe kiel tradukanto de Grimm-fabeloj
22. Ideoj kaj idealoj en la verkoj de Zamenhof
23. Analizo de libere elektita poemo de Zamenhof (enhavo kaj formo)
24. Analizo de libere elektita poemo de la unua periodo (enhavo kaj formo)
25. Antoni Grabowski kiel artisto kaj lingvisto en *El Parnaso de popoloj*
26. Grabowski kiel evoluiganto de la poezia lingvo surbaze de la traduko de *Sinjoro Tadeo*
27. Analizo de elektita originale verkita prozaĵo de la unua periodo
28. Analizo de elektita novelo de la unua periodo
29. Analizo de elektita teatraĵo de la unua periodo

Rimarko: Ĉiu rajtas proponi sian propran temon de la skribtasko post la interkonsento kun Tomasz Chmielik kaj Lidia Ligeza